

Kritika rigardo al materialismo

Eble multaj el vi demandas, kial monismaj filozofioj trovas eĥon inter homoj. Kial ili vastiĝas aŭ kial ni ĉiuj kaj precipe lernantoj kaj studentoj estas nun devigataj akcepti sendiskute materialismon?

Homo ne estas iu fabrikaĵo, kiu en unu serio tute egalas, kaj kiu varias nur en tipoj kaj kategorioj. Homo estas estaĵo, kiu diferencas en ĉiu unuopulo. Estas homoj bonaj kaj ankaŭ malbonaj. Estas ankaŭ homoj humilaj kaj homoj tro memkonsciaj, regemaj. Tiaj en multaj kazoj ne estas komplezaj konsenti kun la fakto, ke ekzistas iu respektinda forto supernatura. Ili ja konsideras sin homoj, kiuj pro sia ĉiopoveco fariĝas dioj mem.

Monismo, niaflanke materialismo, donas al ili kredon, kiu tian gradiiĝon. Ĝi donas al ili teorion, kiu pravigas ĉiun agon kontraŭ homa konscio, kiu pravigas miskomprenojn kaj krimojn. La teorio en vualo filozofia kaj alte "sciencia" forigas ĉiun suspekton, ke oni aranĝas ion kontraŭ principoj de prudento kaj humanismo.

La materialismo eliras materion kaj rigardos ĝin substancon kaj rezultojn detale.

La dua poluso estas idealismo. Ekzemple panteismo agnoskas Dion, kiu laŭdire enestas ĉion. Ĉio estas parto aŭ afekto de unu dia estaĵo. Ĝi devas nepre fiski, ĉar homo, kiu estas ankaŭ parto aŭ afekto de Dio, ne povas havi religion, ĉar li adorus sin mem. Pere de ĉiu homo kaj parolus kaj agus Dio. En okazo de kontraŭdiroj neigus Dio sin mem. Oni ne rekonus bonon kaj malbonon, ĉar ĉio devenus de Dio. Ne nur nocio "homo" estus Dio, sed ĉio aparte, do ankaŭ krimulo, ankaŭ naturo, ĉio ... kia naiveco!

Idealisto (filozofia) vidas en ĉio nur ideon, spiriton, materio laŭdire estas reflekso en niaj sensoj. Kaj kvankam materialsimo asertas ĝuste malon, mi kondukos ankaŭ ĝin al similaj deduktoj. Sed unue necesas konatiĝi kun materialismo, do aŭdu ĝian teorion, aŭskultu atenteme, por ke ankaŭ vi povu kvitiĝi kun la afero aŭ en postprelega diskuto kvitiĝi kun mi, se vi havas dubojn aŭ se via konvinko estas alia. Jen tri reguloj de materialismo – komprenu la dialektika!

1. Laŭ klasikuloj, precipe laŭ J. V. Stalin, mi citas: "Filiozofia materialismo de Karel Marx eliras el tio, ke la mondo estas laŭ sia natureco materia, ke diversaj fenomenoj en la mondo estas diversaj specoj de moviĝanta materio, ke reciproka kontinuo kaj reciproka kondiĉeco de fenomenoj estas evoluaj regulaĵoj de moviĝanta materio, ke la mondo evoluas laŭ reguloj de moviĝo de materio kaj ĝi tute ne bezonas ian "mond-spiriton". "
2. "Materio, naturo kaj ekzisto estas objektiva realaĵo, ili ekzistas ekster la konscio kaj sendepende de ĝi, materio estas primara, ĉar ĝi estas fonto de sensaĵoj, imagoj kaj de konscienco, dum la konscienco estas sekundara, deduktita, ĉar ĝi estas reflekso de materio, reflekso de ekzisto. Pensado estas produkto de materio, kiu atingis dum sia evoluo altan gradon de perfekteco, nome ĝi estas produkto de cerbo, la cerbo poste organo de pensado. Tial ni ne darfis apartigi pensadon de materio, se ni ne volas fali en grandan eraron."
3. "Filozofia materialismo eliras tion, ke la mondo kaj ĝia laŭleĝeco estas plene ekkoneblaj, ke niaj ekkonoj de naturleĝoj, pruvigitaj per spertoj kaj praktiko, estas ekkonoj fidindaj, havantaj signifon de objektivaj veroj, ke en la mondo ne estas neekkoneblaj aferoj, sed estas sole aferoj ankoraŭ ne ekkonitaj, kiuj estas trovotaj kaj ekkonotaj per klopodoj de scienco kaj praktiko."

Tiuj tri reguloj estas tuta fundamento, el kiu materialistoj deduktas pluon.

Laŭ mia kritiko de panteismo vi jam povas konkludi, ke mi ne intencas defendi kian ajn hiperbolan spiritualismon de idealistoj. La ĵus cititajn regulojn de materialismo mi ankaŭ neniam aprobas, do vi povas prave opinii, ke mi agnoskas la filozofian dualismon. Kial?

Mi ne povas konsenti kun la mondo sole materia, ĉar tiu kredo supozas, e:

1. la universo estas eterna,
2. celhava organizo de kosmo kaj naturo estas nura hazardo,
3. la vivo evoluis mem el senviva materio,
4. homo estas nur inteligenta besto,

5. materio estas primara, konscio el ĝi produktita,
6. morala leĝo eterne kaj ĝenerale valida ne ekzistas,
7. sopiro je feliĉo kaj sento por justeco en ĉiuj homoj estas malsaĝa iluzio – postmorta vivo ne ekzistas,
8. delongaj religiaj inklinoj estis kaj estas stultaĵoj – Dio ne ekzistas,
9. ne estas nekkoneblaj aferoj.

Ni analizu ĉi supozojn, ĉu ili estas pravaj, ĉu ni trovos en ili almenaŭ unu eron de vero, unu eron de vero supertempa, absoluta kaj ne ian nerealan veron dialektike materialisman.

1. Pri eterneco de universo mi ekzemple legis en libro "Kiel kreiĝis universo" de B. A. Voroncov Veljaminov (en enkonduko): "... la mondo aŭ universo neniam kreiĝis kaj neniu iam kreis ĝin, kaj ankaŭ neniam ĝi finiĝos. La kosmo estas en sia movo kaj evoluo eterna." La libro estis ĉehlingve eldonita ne la j. 1946. Aŭtoro nomas sin sciencisto kaj aliaj konceptoj estas laŭdire legendoj. Ho, ĝis kie venis lia scienco, ĝis kiaj absurdaĵoj. Por vera sciencisto estas ja tute klara kaj sendiskute komprenebla, ke la universo ne estas eterna. Legante ĉi-verkon de la soveta sciencisto mi miris, ĉar mi tiam ankoraŭ ne antaŭvidis tiom da sensencaĵoj en duono de la 20-a jarcento.

Por ke mi pruvu al vi tempan limigon de universo, sufiĉas, se mi eldiros vorteton "entropio", pri kiu jam parolis s-ano J. Cink. La entropio estas respektenda fakto, kiun ne eblas forigi, ĉar ne estas provebla memvola kreado de nova materio. Kiel mi legis scivoleme en libro de B. Engels "Dialektiko de naturo", materialistoj kredas, ke en estonteco homoj pruvos, ke ie iel aperas nova materio. Laŭdire per nunaj moderaj iloj homo ne povas tion pruvi. Tio estis preskaŭ antaŭ cent jaroj. Kaj nunaj sciencaj kaj teknikaj rimedoj ankoraŭ ne sukcesis trovi tiom deziratan malon de "terura" entropio, kiu tamen validas. Homo povas ĝin nur konstati kaj ne halti.

Scienco pruvis, ke tuta kosmo konsistas el samaj elementoj, el samaj atomoj. Tion finfine akceptas ankaŭ materialistoj, sed surde ili malaprobas, ke samaj naturaj leĝoj validas en tuta universo same kiel sur nia Tero. Tia niava asertado tuŝas ankaŭ nemitan entropion.

Kiam ni pririgardas la kosmon hodiaŭ, kiam ni esploras ĝian pasintecon kaj imagos la estonton, ni konstatas, ke ĝi pli kaj pli maljuniĝas, ke ĝia pasinteco estis nekompareble pli energiorika, verva, ŝanĝema, kaj ke ĝia mikro- kaj makrokosmo pli kaj pli konstatiĝas, paliĝas kaj dum miliardoj da jaroj grandega energio en amasoj da atomkernoj perdos uzeblan forton kaj materio alproksimiĝos al "estingiĝinta skoria vulkano". La fino, se la fino venos, estis do la komenco, sed kiam kaj kiel?

Veljaminov diras, ke "universo estas en sia movo kaj evoluo eterna". Tio okulfrapas ankoraŭ per io alia. Se ni supozas evoluon valida kaj eterne daŭra, poste la universo, mondo, naturo, ni kaj ĉio cetera devus havi plej superan perfektecon, la perfektecon neimageble altan, kiu jam ne kapablus evolui plu. Ĉu ni kaj ĉio cetera estas ideale perfektaj? Se tia stato ne ekzistas, nepre en pasinteco la perfektiga procedo havis sian komencon. Tio estas el vidpunkto de evoluo, kiu spite sian agnoskon de materialisma teorio ne konvinkis materialistojn pri tempa komenco.

La komencon en la tempo konstatis ankaŭ modernaj sciencistoj. Per certa maniero eblas esplori aĝon de firma terŝelo kaj ankaŭ de alflugintaj meteoridoj. Finaj ciferoj en ambaŭ kazoj estas preskaŭ la samaj, nome kvin miliard-jaroj.

En papa encikliko al studentoj mi legis, ke "observado de pluraj spiral-nebulozoj fare de C. E. Hubbue en observatorio Mont Wilson kondukis al gravaj rezultatoj, kiujn kompreneble necesas preni kun rezervo. La malproksimaj galaksiaj sistemoj reciproke foriĝas de si en tia rapideco, ke distanco inter du tiaj spiral-nebulozoj proksimume dum 1300 milionjaroj duobliĝos. Se ni rigardas returne tempon de la procedo, montriĝas, ke ankaŭ unu ĝis dek miliardoj da jaroj estis materio de ĉiuj spiral-nebulozoj premita en unu loko relative malgranda, kiam kosmaj procedoj sin komencis."

Iu povas demandi, kial ĝuste "sin komencis"? Probable tiam estis eksterordinaraj kondiĉoj. Krom materio mem ankaŭ ties denseco kaj nepre ankaŭ premo kaj temperaturo atingis kapturan altecon. Tiajn kondiĉojn la scienco ne scipovas ekspliki, des malpli materialismo.

Ideo pri kreo de materio, pri kreo de la kosmo, estis longtempe malakceptata. Jam Plato asertis: "Materio ekzistas. El nenio nenio estiĝas: tial materio estas eterna. Ni ne povas permesi

kreon de materio." Ankoraŭ antaŭ tridek jaroj opinioj de multaj sciencistoj persiste ripetis similajn konceptojn. Sed tago post tago, jaro post jaro scienco progresas kaj mi citos al vi vortojn de moderna unuaranga sciencisto Edmund Whittaker: "... divesaj kalkuloj kunfluas en rezulto, ke (antaŭ unu ĝis dek miliardjaroj) estis tempo, kiam kosmo, se ĝi ekzistis, havis formon tute diferenca de kio ajn al ni konata. Tial ĉi tempo prezentas la plej malproksiman limon de scienco. Ni eble povas sen malĝusto apelacii je ĝi kiel je tempo de kreo. Ĝi donas al ni la saman fonon de mondkompreno kiel evidenta teologia fakto, ke ĉiu sur Tero ekzistanta organismo havis komencon en tempo. Se ĉi-rezulton atestus estontaj esploroj, ĝi povus esti konsiderata la plej grava malkovro de nia epoko, ĉar ĝi estas fundamenta ŝanĝo de scienca koncepto pri universo, simila fundamenta ŝanĝo, kiun faris antaŭ 400 jaroj Kopernik."

Materialisma dogmo, ke materio kaj energio estas senfina, perfekta kaj eterna, ne pruvas taŭgecon. Homo per neniu rimedo kapablas deturi materion kaj energion, sed ni ne rajtas el tio konkludi, ke ĝi estas eterna.

Materialistoj konsideras materion kiel kaŭzon de ĉiuj fenomenoj, kvankam estas klara, ke mem materio bezonas kaŭzon, kiu eksplikas ĝian komencon, movon, evoluon, celadon. Herakleito estas antikva greka filozofo, kaj ni devas konfesi, ke lia filozofio diferencas de dialektika materialismo sole per pli evidenta simpleco. La dua brilas per riĉa vesto, per terminaro, sistemo, grandaj klasikuloj, tradicio, aŭtoritateco ktp. Fakte ĝi estas same fabela. Herakleito instruis, ke "la mondo, sola elĉio, estis kreita de neniu el dioj, nek homoj, sed ĝi estis, estas kaj estos eterne viva fajro laŭleĝe flamiĝanta kaj laŭleĝe estingiĝanta." V. I. Lenin pri tio diras: "Tre bona eksplikado de principoj de dialektika materialismo." Do Lenin aprobas fajron kiel bazon de eterna mondo; se ne laŭvorte, do nepre principe, ĉar materialismo dialektika havas saman principon. Fajro – fonemo natura – fonemo de ĥemiaj ŝanĝoj, ĝi estas eksplikanta la mondon? La fajro estas senfine perfekta kaj eterna? La fajro estas kaŭzo de la mondo? Ĉi tie superfluas ĉiu scienco, ĉar ĉiu scias, ke fajro povas nenion ekpliki, sed ke ĝi ne eksplikon kaj kaŭzon bezonas.

Materialismo apogas sin je nepruvita kaj nepruvebla hipotezo, ke krom materio kaj energio ekzistas nenio plu.

Se iu opinias mondon hazardo, li evitas, ĉar hazardo signifas neniun kaŭzon.

Se iu diras, ke la mondo na havas kaŭzon, do poste ĝi devenas de si mem. La mondon enestas ĝia origino. Kaj ni jam scias, ke tio ne eblas, ĉar estaĵo, kiu mem enhavas sian originon kaj kaŭzon, devas esti

- a) neŝamĝebla
- b) nedetrujebla,
- c) eterna.

La mondo ne respondas al la tri punktoj. Ĝi do havas kaŭzon ie ekstere, ne interne. La mondo havas komencon. Antaŭ la komenco ĝi estis en stato de ebleco, nun ĝi estas en stato de realo. Sed ne nur la mondo, ankaŭ vi, via vesto, via domo antaŭ jaroj estis en stato de ebleco. Jam antaŭ multaj jaroj ekzistis argilo, ŝtono, kalko, aŭ ties modifikaĵoj, kiuj kreas vian domon. Sed ĝi ne kreiĝis mem, ĉar ankaŭ ĝi rilatas la regulon de neŝanĝebleco, nedetrujebleco kaj eterneco. Venis arkitekto kaj masonistoj. Ili konstruis, ili kaŭzis la domon. Ili transformis ĝin el stato de ebleco al stato de realo. Simile okazas kun ĉio alia kaj ankaŭ kun la mondo, kiun ankaŭ ia arkitekto transformis el stato de ebleco al stato de realo. Sed tiu arkitekto havas pli superan rangon kaj kvaliton, ĉar diference de homa arkitekto Li estas kaŭzo la plej alta.

Se la kaŭzalismo ne estus prava, poste ĉio memvole transirus al stato de realo. Via morgaŭa tagmanĝo jam hodiaŭ estus memkuirita, kaj eble jam dum jaroj ĝi atendus vian morgaŭon. - Ni scias, ke tagmanĝo, domo, homo kaj ĉio cetera ne havas kaŭzon interne, sed ekstere, en persono de kuiristino, arkitekto, patrino ktp.

Kaj ankoraŭ kelkajn vortojn pri movo. Ĉu la movo estas eterna? Movo estas nepensebla sen materio, do tiu aserto kontraŭas la leĝon de entropio. Se unue materio estis en stato de trankvilo, kiu do puŝis ĝin. Por materio ja validas leĝo de inerteco. Kia do estas la puŝanto? Staro de teankvilo ĉe materio estas neimagebla por mi kaj mi opinias, ke ĝi konformiĝas kun stato de materia ebleco. Poste en unu estas arkitekto kaj ankaŭ puŝanto, nome la plej supera kaŭzo.

2. La dua parto asertas kaj dokumentas pri celhava organizo de la universo kaj de la naturo, kiu ne estas nura hazardo, kiu ne povas esti verko de nepensanta materio kaj energio.

Sed mi tiun parton ellasas por ne elcerpi temon de post du semajnoj okazonta prelego de s-ano Josef Cink.

3. En la tria parto mi kondamnos materialisman instruon, ke la vivo evoluis mem el senviva materio.

Anorganika afero vivon tute ne havas, ĝi estas privilegio de afero organika aŭ alie dirite, ĉiu viva organismo el materia vidpunkto konsistas el organikaj kombinaĵoj.

Inter materio organika kaj anorganika estas diferenco. Laŭ jenaj signoj ni povas facile prijuĝi observaĵon:

- a) Anorganika mondo celas al konstantiĝo, al stato trankvila, al egaliĝo de ĉiuj energioj. Ĉe organismoj estas karakteriza memvola movado, agado kaj produktado de varmo.
- b) Organismo estas ankaŭ distingebla laŭ ĝia kapablo asimili. Ĝi akceptas nutraĵon kaj transformas ĝin je sia korpo. En anorganika naturo estas konata kreskado de kristaloj, sed ĝi estas alispeca. Kaŭzas ĝin fizikaj fortoj, ekzemple malvarmigo.
- c) Kapablo generi estas la tria klara signo de organismoj.
- d) Senviva naturo estas kreata el unuopaj speciaĵoj kaj ili en ĉiu ero kaj ereto estas samaj kaj memstareblaj. Ekzemple ŝtono. Se ni dispecigus ĝin, ni ricevas plurajn ŝtonerojn, kiuj povos memstari kaj ilia konsisto estas la sama. Male ĉe organismoj ni trovas tute diferencigitajn ĉelojn – organojn. Krom ĉe la plej primitivaj ni konstatas specialan organon por asimilado, por movado, sekrecio, generado ktp. Ĉe animala korpo diferencas laŭ sia celo ekzemple stomako, pulmoj, nervoj, okuloj kaj la ceteraj. Ĉe plantaĵo rediko, trunketo, folioj, floroj.
- e) Ĉiu organismo renkontas morton, procedon de disorganizo. Anorganikaĵon influas fizikaj kaj ĥemiaj fortoj, kiuj kaŭzas sole mikrokosman kaj makrokosman movon.
- f) Rimarkindaj estas ankaŭ diferencoj en materia formo.

En organikaĵoj troviĝas plej ofte nur kvar elementoj. En tio mem estas nenio stranga, sed la regulecon oni iam miskomprenas, ĉar kelkaj supozas, ke la vivon formas aŭ kondiĉas specialaj animitaj atomoj. Tio eventualan asertadon neniu povas garantii. Nenie mi eksciis, ĉu iu elemento havas ĉiujn atomojn animitaj aŭ estas nur neverŝajna alternativo ĉe atomoj ekzemple de nitrogeno aŭ karbono, hidrogeno aŭ oksigeno. En unua kazo estus animitaj atomoj ankaŭ en naturo anorganika, kiu ja ne kapablas naski kian ajn vivaĵon. Inter naturo organika kaj anorganika je estas diferenco kaj ĵus prezentitan hilozoismon konvenas tuj rifuzi.

Mi diras, ke la diferenco estas netransirebla, sed tion ne sufiĉas kredigi, tion necesas pruvi.

Anorganika naturo ne povas krei organismon, ĝi ne havas kaŭzon por tio, tiel fakte la rezulto superus la materian kaŭzon. La abiogenezo, kiel ĝi nomiĝas, estas plua dogmo de materialismo, ĉar ĉi tia memgenero estas ne nur ne pruvita, sed nepruvebla laŭ Koch kaj Pasteur. "Omne vivum ex vivo!" "Ĉio vivu el vivo!" Tio estas naturleĝo.

Aroganta heroldo de materialismo kun kun abiogenezo komence de nia jarcento estis universitata profesoro en Jena, Arnošt Haeckel. Lia plej konata verko, tradukita jam en 25 lingvojn, estas "Mondaj misteroj". (Ne miru pro la titolo "aroganta heroldo". Trompulo meritas ankoraŭ pli akran nomon.) Do ankaŭ li defendis la memgeneron. Li diris: "La unua ĉelo devis evolui per vojo pure ĥemia el anorganikaj kombinaĵoj karbonaj." Aliloke: "Vivo evoluis el senviva materio; dum eksterordinare favoraj cirkonstancoj estiĝis sur mara fundo la unua viva ĉelo." Li parolas kvazaŭ li estus persona ĉeestinto. En laboratorioj tion ja provis x-oble kaj x-oble ili malsukcesis. Haeckel postulas kredon je miraklo. Li mem deklaris sian instruon "religio de ĉiuj prudentaj homoj". Jes, sed kio estas pli prudenta, ĉu kredi al logika kreo aŭ al nekonata miraklo, sur kiu bazas religio Haeckel?

K. M. Kubeš en sia libro "Kun ŝildo de la vero" skribas: "Haeckel senĉese argumentas konvene kaj nekonvene kiel lia hipotezo venkas religion kaj kredon – li anstataŭas kredon je Dio per kredo je Haeckel!" Ni povas simile diri, ke dialektikaj materialistoj fanfaronas kiel ili venkas

alian konvinkon, religion kaj kredon – kaj fakte ili anstataŭas kredon je Dio per kredo je materialismaj hipotezoj kaj dogmoj.

Kaj fine mi devas rimarki, ke iam pripensataj eventoj de eterna vivo aŭ de ĝia alflugo de aliaj mondoj estus senbazaj, kiel vi aŭdis en pasintjara prelego de s-ano J. Cink.

4. Nun ni ĉesu la meditado pri origino de la vivo, ni konstata ĝin kiel realaĵon. Mi intencas iom preparoli pluan rezulton de materialisma instruo, nome ke la homo estus plej inteligenta besto. Ĝi odoras per evoluismo, kiun oni lastatempe en nia lando propagandas. Espere multaj el vi vidis pasintjare tiuteman ekspozicion en la "Domo de arto". La evoluo de organismoj ĝis "homo sapiens" estis tie konsiderata kiel memkomprenebla, kiel pruvita. Mi atentigas, ke ĝi ankoraŭ ne estas kaŭzo por nia kredo. Laŭ K. M. Kubeš: "Generaciario de la homo, fame konata Stammbaum de Haeckel, havas tiun mankon, ke ĉie ĝi montras sentebajn truojn, mankon de transiraj formoj. La generaciario de praĉelo ĝis la homo laŭ atesito Virchov science valoras kiel generaciario de legendaj herooj de Homer."

Nun oni kredigas ĉe ni, ke homo havas siajn antaŭulojn kiel transirajn formojn. Oni grandanime prezentas al ni imitaĵojn kaj bildojn de homoj Pithecanthropus erectus, Sinanthropus, de homo neandertala, kiuj laŭdire havas komunan praulon kun nuntempaj simioj. Do gorilo, ŝimpanzo kaj orangutango ne estas niaj prauloj, sed niaj kuzoj. Oni prezentas al ni grandan nombron da hipotezoj kaj deduktaĵoj, sed, domaĝe, voĉon de libera scienco oni ne lasus trapenetri en nian zonon. Ĝenerala koncepto de internacia scienco en lastaj dek jaroj tute ŝanĝis sin kaj ni preskaŭ ne scias pri tio. Nur hazarde mi eksciis, ke gloraj Pithecanthropus erectus kaj Sinanthropus jam ne estas gloraj. En lastaj jaroj en orienta Afriko kaj en Anglio estis trovitaj homaj kranioj, kiuj konformiĝas kun moderna homo "homo sapiens". Homo el Piltdown vivis antaŭ 500.000 jaroj, laŭdire en unua periodo interglaciara. Virina kranio el Swanscombe devenas el tempo pli posta, sed apenaŭ ĝi estas samtempa kun Pithecanthropus. Se ni volas konservi evoluajn principojn, kiu tamen eblas flanke de korpo, ni devas ŝovi tempon de fendiĝo multe pli malproksimen. Homa branĉo apartiĝis eble jam antaŭ 10 milionjaroj, meze de terciara formacio. Sed transiraj formoj mankas. Al ni prezentata geneologia tabelo estis fiksita sur bazo de eraraj supozoj. Nun scienco agnoskas kunekziston de pli kaj malpli perfektaj vivaĵoj ankaŭ en estinteco.

Mi ne volas paroli principe kontraŭ evoluismo, kvankam ĝi estas kuraĝa hipotezo, sed nepre mi devas defendi koncepton, ke homo diferencas kvalite de ceteraj vivaĵoj, ke lia konscio ne evoluis laŭ materialismaj supozoj.

Ĉe evoluistoj mi malŝatas memkonscian asertadon. Ni ankoraŭ foje rigardu materialiston Haeckel. Li kompilis geneologian tabelon kaj en ĝi li plenigis ĉiujn truojn nur helpe de sia fantazio. Ekzemple laŭ li inter simio kaj homo transiron prizorgis t.n. simiohomo rekta, kiu laŭdire vivis en Lemurio. Lemurio estas teritorio, kiun nun kovras Hinda oceano. Kiu ne kredas simiohomon, tiu iru al Lemurio! Kvankam Haeckel kuraĝis prezenti sian religion sen ia hezito, tamen li decidiĝis apogi ĝin per dokumentoj. En unu sia verko li presigis vicon da bildoj, ekzemple bildojn de homembrioj, de simiaj embrioj kaj de la hundoj. Ĉiuj tri 100-oble pligrandigitaj kaj tute samaj. Aliloke li prezentis embriojn de hundo, kokino kaj testudo. Ankaŭ ili estas sur bildoj tute samaj. Kiam profesoro His "prenis okulvitrojn" kaj detale pristudis ilin, li fine konstatis, ke temas sole pri unu bildo trifoje reproduktita. Multaj trompaĵoj estas sur pluraj bildoj kaj tabeloj. Li provis falsi instruon pri protoplasmo kaj ĉelo, por ke li forigu abismon inter estaĵoj vivaj kaj senvivaj. Kiam oni pruvis lian trompon, li senkulpigis sin dirante, ke li havis bonan intencon. En sia kolekto ĉe unu simio li fortranĉis voston, li donis al ĝi novan nomon kaj tiel plenigis unu truon en generala tabelo. Kia sciencisto! Trompulo! Kaj jen, konata kiel unuaranga esploranto, reprezentanto de scienco kaj vastiganto de lumo. (Laŭ P. M. Kubeš).

Malgraŭ granda peno de multaj adeptoj de evoluismo, ĝi ankoraŭ ne estas kredinda. Jen lastaj membroj de genera tabelo: simio, simiohomo, homo vostonhava, homo neparolema, homo stupida (ĉl. pitomec) kaj homo prudenta. Domaĝe, ke estas konata nur unua kaj lasta ceno, ĉiuj mezaj figuroj estas nur fantaziaĵoj. Tiukaze konvenas iom kompari la du ekzistantajn membrojn, sed nur en koncizaj skizoj:

Pasintan someron mi aŭdis viglan disputon de du viroj pri tiu ĉi temo. Unu klopodis menci aron da korpaj similaĵoj inter homo kaj simio kaj tiel argumenti por ties parenceco (ho, kiajn sopirojn rilate prauloj havas moderna homo!). La dua konvinkita pri malo penis argumenti per malsimilaĵoj. Kia blindeco, mi konstatis. Ĉu la homo staras super la naturo, super ĉiuj simioj, pere de siaj iom aŭ pli diferencantaj korpaj signoj? Ĉu la korpo faras homon "homo sapiens"? Bedaŭrinde multaj forgesas, ke ili havas ankaŭ ioman prudenton, konscion, penskapablon, li havas animon.

Jes, korpaj signoj estas iom similaj. Ranke diras: "Se la homo havus voĉorganon de la simioj, li povus ĝin perfekte uzi por paroli." Kial do simioj ne parolas? Homo povas eĉ gepatran lingvon forgesi dum longedaŭra restado eksterlande; sed ĉu besto forgesas ian scipovon? Klare vidiĝas diferenco en spirita flanko.

Diferencoj inter bestoj kaj homoj laŭ P. M. Kubeš – mallongigite:

1. Ĉiu homa ekkono komenciĝus per sensoj. Besto ĉe la sensa ekkono haltas, homo iras plu. Besto perceptas lumon per okuloj, sonon per oreloj..., homo ofte serĉas kaj trovas kaŭzon de la percepto kaj ankaŭ de la fenomeno. Kaŭzon, kiun li ne vidas, ne palpas. Homo ekkonas ankaŭ rilatojn, ekzemple rilaton de rimedo al la celo, kaj tio faras lin kapabla inventi ilin. Por besto estas iloj propraj organoj, sed inventi kaj pretigi ĝi scipovas eĉ ne la plej primitivan ilon.

2. Homo ne nur inventas, li ekkonas ankaŭ negacion, mankojn kaj malperfektaĵojn – la aferojn, kiujn ne eblas percepti per sensoj ... Besto vidas nur lumon de kandelo, homo komparas ĝin kun la subrilo kaj rimarkas ĝian malsufiĉon, li penas ĝin perfektigi, inventi pli oportunan lumon ..., homo estas vivaĵo progresema! Bestoj scipovas ankaŭ produkti aĵojn lertege, ekzemple abelo konstruante ĉelaron. Sed ĝi dum miljaroj neniom progresis. Homo agas racie kaj prudente, besto instinkte.

3. Homo meditas pri estonto, kiun ne eblas percepti per sensoj.

4. Homo el perceptaĵoj kreas abstraktajn nociojn. Li vidas pomon, piron, prunon kaj deduktas komunajn signojn, kiujn ligas en unu nocion "fruktoj". Tio estas bazo por pensado kaj juĝado. Sen abstraktaj nocioj ne eblas prijuĝoj kaj nek lingvo.

5. Homo ekkonas aferojn supernaturajn, li kreas nociojn kiel "virto, rajto, devo, bono, klero, gloro ...". Gravitacion kaj inertecon neniu vidas, ni perceptas nur la efikojn de tiuj naturleĝoj. Se la sensoj kapablas sensumi ilin, homo "ekvidus" ilin jam en pratempo. Sed li malkaŝis ilin nur antaŭ nelonge per pena racia esplorado. Se besto scipovus krei nur unu juĝon, ekezemple 1 plus 1 faras du aŭ "Mi estas", fakte estus baro inter ĝi kaj homo trarompita. Neniu haltigus beston sur vojo de progreso.

6. Libera volo ekzistas nur ĉe homo, ne ĉe senviva materio, nek ĉe bestoj. Tio signifas, ke volo, mi diru animo, ne dependas de materio, de korpo.

7. El tio rezultas animo senmorta.

Kaj fine de ĉi-parto – en la naturo ekzistas diversaj animalaj klasoj apud si; la klasoj estas evidente rimarkeblaj. Se aksiomoj de darvinismo estus pravaj, ne estus troveblaj novaj klasoj, novaj specoj, sed nur konfuzo de diversaj specoj kaj ne ordo. Vo al homo estus riĉa je transiraj formoj.

8. Lasta supervido jam tre alproksimiĝis al temo pri antaŭeco ĉu de materio ĉu de spirito.

Materialismo asertas, ke la unua estis materio, ĉar ĝi estas fonto de sensaĵoj, imagoj kaj konscienco.

Materialismo asertas, ke ideon ne eblas apartigi de materio, kiu pensas.

Materialistojn rajtigas kompreni antaŭecon de materio ilia konvinko, ke materio kapablas

pensi, ke konscio estas reflekso de materio, produkto de materia fonto, kiu estus speciale aranĝita kaj tiun miraklan aranĝon laŭdire formis dum longa tempo labora procedo.

Laŭ mia opinio sufiĉas pruvi, ke konscio ne estas produkto de cerbo, reflekso de materio. Poste estas komprenebla, ke materia korpo ne povas esti kaŭzo de spirita animo, ĉar rezulto superus la kaŭzon. La animo devenas de Dio. Kaj la demandon, kio estis pli frue, mi respondas same kiel materialistoj. Mi pensas, ke embria stato de homo estas homo en stato de ebleco. Homo tuta, liganta korpon kaj animon, estas kreata post atingo de certa grado de korpa evoluo.

Mian malkonsenton kun materia pensado mi eksplikas jene. Pripensu du komparojn: Pensado estas produkto de cerbo! Simile – tempo estas produkto de horloĝo! - - Sen penso ne estas ideo. Pensoj estas agado de cerbo. Sen instrumento ne estas muziko. Muziko estas agado de instrumento. Komponisto superfluas. Ho, kia bonega instrumento!

Ŝajne vi jam scias, kion mi volis aludi. Cerbo estas nur perilo de animo. Argumentojn mi jam parte menciis, kiam mi parolis pri diferenco inter homo kaj besto. Krome mi aldonas:

Se homo estas materia estaĵo kaj nenio pli, mi ne povas diri, ke post sep jaroj mi ekzistos. Post sep jaroj mi ne estos mi. Post sep jaroj min prezentos alia korpo, tute alia materio, ĉar dum sep jaroj ĉiuj molekuloj, kiuj prezentas mian korpon nun, estos for, anstataŭos ilin molekuloj novaj. Se en tio scienco estas prava kaj se ankaŭ materialisma aserto pri konscio kiel reflekso estas prava, do poste jam pura memoro ne daŭras pli longe ol sep jarojn. Kaj kiel eblas, ke homo unuafoje povas rememori okazintaĵojn 10, 30, 50 jarojn malnovajn? Do memoro ne estas materia enskribo en cerbo.

Per analizo de patologiaj malsanoj, kiuj plej bone montras rilaton de konscia stato kaj de cerba stato, pruvis Henri Bergson, ke opinio ri egaleco de ambaŭ statoj estas nedaŭrigebla. Laŭ lia analizo ni devas distingi memoron korpan aŭ ripetitan kaj memoron puran, imagpovan, sen rilato al materia rilato. La unuan ni havas saman kiel bestoj kaj cerbo estas ĝia centrejo. Sed cerbo neniam povas esti centro de memoro imagpova, de memoro reala, kiu apartenas al pli alta sfero de konscio. Estante tuj preta ĝi kapablas en unu momento trarigardi tutan nian historion aj prepari nin por decida ago. (Laŭ D. Pecka).

Tio estas la sfero de homa animo. Materio estas ligita je spaco kaj tempo, sed animo ne. Ĝi povas eĉ sian procedon de sia ekkono fari objekton de plua ekkono. -

Pensado estas fosforeskado de cerbo! - Ho ve! Tiukaze ni povus pensadon mezuri per milimetroj aŭ esprimi ĝian pezon en gramoj.

Animo estas pura agado! - Ho ve! Agado sen subjekto estas kvazaŭ movo sen materio.

Ostwald diras, ke ĥemia energio de cerbo sin transformas en energion animan. - Sensencaĵo! Kiel povas transiri procedo materia al procedo spirita? Se materia energio ĥemia transiras al energio anima, devus ankaŭ ĝi dum pensado transformi sin ekzemple al movo, varmo, lumo ktp. Jen ĉe horizonto estas granda invento gravega por niaj loĝejoj en nia lando. Se tuta familio streĉe pensos, estos lumo kaj ankaŭ varmo sen karbo. Se ne, falus laŭ Ostwald leĝo pri konservo de energio.

El tio ĉio rezultas, ke tamen homo havas pli vastan horizonton tiam, se li agnoskas ankaŭ objektivan realaĵon spiritan. Materialistoj konas nur objektivan realaĵon materialan.

6.-7. Materialisman filozofion refutas ankaŭ "morala leĝo" kaj sopiro je feliĉo kaj justeco". De ties dokumentado mi rezignas pro sufiĉa materialo jam prezentita kaj pro manko de tempo.

8. Materialisma filozofio ne respektas principojn de ĝusta pensado. Ĝia bazo estas malaprobo de nemateria mondo kaj Dio. Ĝi eksplikas ĉion helpe de naturaj leĝoj de materio kaj energio. Materialistoj estas konvinkitaj pri sia sukceso, ĉar ili ofte elparolas sorĉan vorteton "scienco". Mi vidas ilin idealistoj, car ilia sukceso ne alvenas kaj vorto scienco ĉe ili prenas alian nuancon. Kelkfoje ilia scienco havas karakteron de niaj avoj kaj praavoj el tempo de Newton.

Jen, kion skribas Georges Politzer en "Fundamentoj de filozofio": "Por ke Dio povu ekzisti, li devus havi carbon. Tial ni darfus diri, ke Dio ne kreis materion kaj homon, sed materio en formo de homa cerbo kreis Dion-spiriton." Aliloke: "... materialistoj, apogante sin pri sciencoj, asertas kaj pruvas, ke materio kreas spiriton kaj ke ili ne bezonas "hipotezon de Dio" por ekspliki kreon de materio."

Dio ekzistas. Ĉi tiun veron supozis ĉiuj miaj antaŭaj deduktoj kaj argumentoj. Dion konstatas ankaŭ triobla leĝo, kiu validas en tuta kosmo:

Kie estas la fakto, tie estas kaŭzo.

Kie estas ordo, tie estas ordiganto.

Kie estas leĝo, tie estas leĝdonanto.

Por iu interesa, por iu memkomprena estas universaleco de kredo je Dio, kiun ni trovas ĉe ĉiuj nacioj. Imagoj diferencas, sed ĉiam temas pri unu aŭ pli da supernaturaj estaĵoj.

Tion deklaris jam Cicerono en verko "Pri leĝoj": "Krom homo ne ekzistas animalo, kiu iel ekkonas Dion; sed inter homoj ne estas nacio civiliza, nek indiĝena, kiu eĉ se ne sciante kian Dion konvenas adori, ne ekkonus, ke necesas ian havi."

Universala kredo je Dio ne estas trompo. Se homo ĉie kaj ĉiam venus racie al ekkono, ke ekzistas Dio, estas tiu universala ekkono voĉo de natureco. Tio povas iom subteni vortoj de Aristoteles: "Kion ĉiuj homoj kvazaŭ instinkte pelataj opinias vero, tio estas vero de naturo."

Kaj nun reaŭdu unu komparon: Moderna sciencisto tre bone esploris la mondon kaj naturon, li trapenetris ĉion ĝis la plej malgrandaj eretoj de atomoj, kaj nenie li trovis Dion. - Jes, volonte mi kredas. Mi ankaŭ tre bone esploris mian horloĝon, mi trapenetris ĝin ĝis la plej malgrandaj konsistaĵoj kaj nenie mi trovis horloĝiston. Bedaŭrinde.

9. Kaj fine kelkajn vortojn pri noetiko, t.e. pri ekkoneblo de la mondo.

Materialisma noetiko asertas kuraĝe, eĉ tro memkonscie, ke la mondo estas tute ekkonota. Sed plue ĝi diras, ke pro evoluo tiu procedo de ekkono neniam finiĝos, neniam ni atingosla veron absolutan.

Ĉe materialisma ekkon-procedo estus tri gradoj kaj la decida estas praktiko. Nenio eksterordinara kaj instiga al troa memkonscio. Ĉu materialisma noetiko havas ian "kaŝitan atuton"? Apenaŭ! Ĝi ja havas siajn mankojn. Ĝi volas ekkoni ĉion, sed kiel ĝi eksplikos kaj garantios ekkoneblon de objektiva mondo? Ĉu esplori per dialektika metodo, kiu enhavas tiom da mankoj, konfliktoj kiel vi jam aŭdis?

Esplori, inventi, konstrui estas inda agado por homo. Ni atingas ĉie en la mondo belajn kaj ĝojigajn rezultojn sur kampo de ĉiu homa laborfako. Ni estu optimistoj kaj kredis je grandaj bonfaroj estontaj. Tio estas ĝusta. Sed kial arogante meti tian nerealan regulon en seriozan filozofian sistemon? Ĝi estas sen esenco.

La materialismon mi komprenas kiel rimedon por eduki ne individuon, sed kolektivon, por eduki ne homon, sed fakajn kadrojn kun unusola mondkoncepto, kun unueca konvinko: servi senpripense al la afero. Senpripense tial, ke unuopulo ne rajtas montri sian personecon kaj kolektivo havas ideon kaj koncepton jam pretan, pripensitan de iu alia senpersona grupo, speciale por tio destinita per sia rango. Personeco tia estas kripligita. Nome "homa agado ne estas libera, ĝi estas necesa rezultato de diversaj fortoj, kiuj efikas en la homo kaj kaj ankaŭ ekster li. Materialismo malaltigas homon je nura maŝino, ĝi senigas lin de idealoj, ĝi incitas en li malaltajn instinktojn. Materialisme pensanta homo devas zorgi antaŭ ĉio pri sia prospero, ĉar li ne havas impulsojn, kiuj instigus lin, ke li sian prosperon oferu al interesoj pli altaj." (Dr-o Bedřich Augustin).

Vortojn, kiujn vi aŭdis, bonvolu mem pripensi, lasu ilin trapenetri vian kritikemon kaj finan sintezon varmigu en via koro kiel vian propran filozofion, kiel vian propran mondkoncepton.

Brno la 9-an de marto 1954 – prelego en Esperantista Klubo en Brno.

Uzita literaturo:

P. Konrád M. Kubeš T.J.: "Kun ŝildo de la vero".

ThDr. Bedřich augustin: "Fundamenta religia instruo".

Prof. P. Dominik Pecka: "Fuĝo antaŭ metafiziko, aŭ pri dialektik materialismo.

J. V. Stalin: Pri dialektika kaj historia materialsmoj.

Frederiko Engels: "Dialektiko de naturo."